

Matthias Claudius,
Vespera kanto

tradukita de Adolf Burkhardt

1. Leviĝas luno; hele
orpompas surĉiele
la steloj al l'okul'.
Arbaro mute revas;
el la herbej' sin levas
mirinde blanka la nebul'

2. Ripozas mont' kaj valo
sub la krepusk-vualo
trankvile kvazaŭ lag'.
Por vi jen la permeso
fordormi en forgeso
la malbonaĵojn de la tag'.

3. La luno nur duone
Prezentas sin impone;
ĝi tamen estas sfer':
Facile ni priridas
aferon, se ni vidas
nur parton de la plena ver'.

4. Homidoj ni fieraj
pekuloj nur, mizeraj;
ne multon scias ni.
Ni teksas iluziojn
kaj serĉas multajn sciojn
kaj devojiĝas pli kaj pli.

5. Ho Di', nin lasu vidi
la Savon, ne plu fidi
vantaĵojn de l' pasem'!
Nin faru simpl-animaj,
infane Dio-timaj
en ĝoj', jam nun sen zorga trem'!

...

Matthias Claudius,
Vespera kanto

tradukita de Guido Holz

1. La luno nun ekhelas,
Steletoj oraj belas
En la ĉiela klar';
L'arbaro nigra revas,
Kaj el herbejo levas
Mirige sin nebula mar'.

2. Silenta estas mondo
Kaj en krepuska rondo
Hejmecas kun favor'!
Similas kalman ĉelon,
En kiu vi kverelon
De l'tago dorme pelu for.

3. Ĉu vi la lunon konas?
Aspekto nur duonas,
Sed rondas ĝi en bel'.
Do ankaŭ estas multo,
Loganta al insulto,
Okulojn ĝenas la malhel'.

4. Ni homoj tiel vantaj
Ja estas nur pekantaj,
Malvasta nia sci';
Ĥimerojn ni eltrikas,
Ni multe artifikas
Kaj perdas celon pli kaj pli.

5. Vidigu, Dio, savon,
Pasem' ne veku ravon,
Ne ĝoju ni pro glor'!
Fariĝu malafektaj
Ni kaj al vi respektaj,
Infane gaju nia kor'!

...

Matthias Claudius,
Vespera kanto

*tradukita de Joachim
Gießner*

1. La luno jam leviĝis,
steletoj ekheliĝis,
ravante homojn nin.
Silentas la arbaro
kaj super la kamparo
nebulo pala levas sin.

2. Neniu vento blovas,
la mond' ne plu sin movas
sub paca, klara lun'.
Nun petu noktan benon,
de l'tago la ĉagrenon
dormantaj vi forgesu nun.

3. Jen luno sur ĉielo
en brila ronda belo
duon-videbla nur.²
Ĉar multon ni ne vidas,
ni ofte ĝin priridas,
malsaĝe juĝas kun plezur'.

4.
.....
.....
.....
.....
.....

5.
.....
.....
.....
.....
.....

...

²S-ro Gießner unue tajpis:
duona tamen nur.

6. Vi fine, sen ĉagreni,
el mond' nin volu preni
per milda morto for.
Nin tiam al ĉielo
venigu, al la celo:
Vi, nia Dio kaj Sinjor'!

6. Vi gracu, sen ĉagreni
El mondo nin forpreni
Al fin' per milda mort'!
Kaj post forpren' fidele
Hejmigu nin ĉiele,
Sinjoro, Dio, nia fort'!

6.
.....
.....
.....
.....
.....

7. Gefratoj, nun ekkuŝu!
Vin nokta vent' ne tuŝu,
dum ŝirmas anĝelar'.
Indulgu, Di', nin grace,
por ke nun dormu pace
ni kaj malsana la najbar'.

7. Kuŝigu do kun pio
Vi en la nom' de Dio,
Jam fridas nokta vent'.
Per punoj, Di', ne ĝenu,
Per dolĉa dorm' nin benu,
Najbaron ankaŭ en turment'.

7. Ĉe l'fino de la tago
kuŝigu vin sen plago,
silentas la anim'.
Ne punu nian faron,
sed nin kaj la najbaron
dormigu, Dio, nun sem tim'.

*Traduko de la Germana poemo
"Abendlied" de MATTHIAS CLAUDIUS (*1740-08-15 - †1815-01-21) en
Esperanton de ADOLF BURKHARDT (pastro, *1929-04-10 - †2004-04-02).*

*Traduko de la Germana poemo
"Abendlied" de MATTHIAS CLAUDIUS (*1740-08-15 - †1815-01-21) en Esperanton de
GUIDO HOLZ (*1920 - †1989).*

*Traduko de la Germana poemo
"Abendlied" de MATTHIAS CLAUDIUS (*1740-08-15 - †1815-01-21) en Esperanton de
JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 - †2003-11-25).*

Arg-394-780 (2007-03-27 19:07:21)

Arg-394-778 (2007-03-26
12:53:22)

Arg-394-782 (2007-03-28
09:55:34)

*Tiun ĉi tradukon mi, Manfred
Retzlaff, prenis el la kant-libreto
"Mia kantaro I", dua eldono de
Majo 1998, kompilita kaj eldonita de
s-ro Josef Schiffer, Wilstorfstr. 58,
D-78050 Villingen-Schwenningen,
Germanio. Sinjoro Josef Schiffer
donis al mi la permeson.*

*Tiu ĉi traduko estas publikigita
en 1984 en "Esperanto aktu-
tuell", la organo de Germana
Esperanto-Asocio, sur la aldo-
naj "Flavaj paĝoj", sur paĝo 14
de la numero 6/984. Mi, Man-
fred Retzlaff, detajpis la tradu-
kon el tiu, en 2007-03-26. Eni-
gis la tradukon de Guido Holz la
tiam redaktisto d-ro Dirk Will-
kommen.*

*Mi, Manfred Retzlaff, detaj-
pis tiun tradukon de Joachim
Gießner el folio kun letero, kiun
skribis al mi en 1987-11-24 s-
ro Joachim Gießner. Li skribis
en tiu letero, ke la fakto, ke lia
traduko de la unua strofo estas
tute la sama kiel en tiu de Otto
Bonte, estas hazardo kaj ke li ne
sciis antaŭe la tradukon de Otto
Bonte.*